

KOMENCANTO

revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Sadretdinova Naila [Voronci, Rusio]

*Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas
senĉese, senfine, senhalte,*

L. Zamenhof, el "Pluvo"

2005

Kiel Baldur Ragnarsson, fama verkisto, akademiano kaj elstara esperantogvidanto igis esperantisto — verkoj de niaj legantoj — ĉu vi scias? diversaj ondoj el bunta mondo — gramatiko serioze kaj amuze — aforismoj anekdotoj — la praktiko — ripozejo — korespondu!

5

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo. 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio David Kelso, 5 Craighill Road, Carlisle, ML8 4QT

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvorčka 1, CZ-696 62 Strážnice

Ĉinio Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037, Beijing

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.

Estonio Virve Ernits, Villimaa 17 --- 8, EE 93812, Kuresaare.

Finnlando Paivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

Francio Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Crisaie, 75004, Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio Viŝnja Brankoviĉ

Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Japanio Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

Nov-Zelando David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Portugallio Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum, Husarlyckeavagen 29, SE --- 24294 Horby

Svislando Christoph Schleidgger, Im Schleidorn 6, CH --- 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

Redakcie

Karaj legantoj!

Ni volas certigi vin, ke iom malgaja aŭtuna humoro, kiun kutime portas tiu ĉi jarsezono, respuguliĝas nur en la bildo sur la kovrilo. En ĉio cetera tiu ĉi numero de "K", male, penas forlogi vin de maĝojigaj pensoj, eble kaŭzitaj de aŭtuno, kaj agordi vin aktive, verkeme kaj scivoleme.

Do, ĉi-foje vi povas legi en "Komencanto" tre interesan rakonton de fama verkisto kaj akademiano Baldur Ragnars-son pri lia sperto de lernado de Esperanto, kiu konvinkas nin, ke lerni Esperanton eblas eĉ en izoleco, ne havante instruiston apude kaj uzante nur malgrandan lernolibron. Kaj tio ne malhelpas poste iĝi elstara, monde konata esperantisto kaj multon atingi sur E-kampo.

Unu el la temoj de tiu ĉi numero estas katoj. Ĉi tie vi povas konstati, kiom diversgenraj povas esti verkoj pri tiuj ĉi, ŝatataj de multaj, hejmaj bestoj: nia aŭtorino el Italio Santi Elena Bullo poetike priskribas sian katon; debutanto el Ĉinio Liu Laiqing rakontas fantastikan sonĝon pri sia katino; aŭtoro el Rusio V.Opletajev amuzas nin per sia traduko de humuraj "kataj reguloj". Ankaŭ iom da pri katoj vi povas ekscii legante rubrikon "la praktiko", kie ni prezentas al vi Esperanto-organizaĵon "Rondo-Kato".

Nia fidela legantino kaj aŭtorino Ginette Martin el Francio ĉiam ĝojigas nin per iu nekutima materialo, neordinaraj malkovroj aŭ observoj en vivo. Ankaŭ ĉi foje estas nepre leĝinda ŝia traduko prezentita en rubriko "ĉu vi scias?".

Publikigo de rakonto pri japana Tea ceremonio reflektas nian propran deziron kiel eble diskonigi kulturajn valorojn de diversaj malsimilaj "mondoj" sur paĝoj de nia periodaĵo.

En tiu ĉi numero vi povos legi ankaŭ unu artikolon de W. Auld pri tio, kiel atingi bonan stilon en lingvouzado kaj en verkado. Ni esperas, ke ankaŭ niaj mallongaj gramatikaj lecionoj utilos por multaj el vi.

Espreble, humuraĵoj de tiu ĉi numero elvokos viajn ridetojn kaj agordos vin ankaŭ bonhumore.

La redakcio dankas s-ron
J. Tilman Williams
el Usono pro la mondonaco al "Komencanto"
\$50

KOMENCANTO

2005 numero 5 // (55) // 6 numeroj jare
regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto Raja Kudrjavceva
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2006:

internacia tarifo: 15 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 12 eŭroj;

aerpoŝta aldono 2 eŭroj

konto ĉe UEA: vkud-a

rusia tarifo: 180 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Baldur Ragnarsson, 1930. Islandano; instruisto, lerneja ĉefinspektoro. Ano de Verkista Asocio de Islando. Verkis islandlingve poembrojn kaj fakajn librojn pri la islanda lingvo. Lernis Esperanton kiel gimnaziano en 1949. Aktivis movade (lande kaj internacie) ekde 1952. Prezidanto de Islanda Esperanto-Asocio dum multaj jaroj. Prezidanto de la Belartaj Konkursoj de UEA 1975-85. Akademiano ekde 1979. Estrarano de UEA pri kulturo kaj eduko 1980-86. Vicprezidanto de UEA 1980-83. LKK-prezidanto de la Rejkjavika UK (1977). Redakciano de Norda Prismo 1958-1974. "Arĝenta sprono de KOKO" pro originala verkado 1964.

... mia Esperanta verkisteco estas al mi pli kara



En mia hejma vilaĝo estis ŝuisto, kiu tenis malgrandan librovendejon en ĉambro apud sia laborejo. Tie inter popularaj romanoj, biografiaj libroj kaj tradiciaj poemoj mi trovis lernolibron de Esperanto. Ĝi enhavis mallongan gramatikon en la islanda lingvo sen ekzercoj, kaj legmaterialon. Mi aĉetis tiun libron pro scivolemo kaj eble kun iom neklara intenco ĝin iam trastudi. Tiam mi havis 14 jarojn. Sekvis du jaroj en duagrada lernejo. La tempo por Esperanto ankoraŭ ne venis.

Kaj jen mi trovis min en Akureyri, urbo en Norda Islando. Unuajara gimnaziano. Iun tagon mi rimarkis en montrofenestro de librovendejo libron kies titolo tuj frapis min rememorige pri mia knabaĝa intereso. Mi eniris kaj petis permeson rigardi la libron. Mi tuj konstatis, ke mi tenis ion eksterordinaran en la mano: la unuan lernolibron de Esperanto en la islanda lingvo, eldonitan en 1909. Temis pri libro bazita sur la fama lernolibro de Théophile Cart, *L'esperanto en dix leçons* - Esperanto en dek lecionoj (1902). La islanda versio, farita de Thorsteinn Thorsteinsson, pioniro de Esperanto en Islando (1880-1979), estis iom pli ampleksa ol la originalo, havanta 12 lecionojn kaj sufiĉe detaian Esperantan-islandan vortaron. Kompreneble mi aĉetis la libron, neniel antaŭsentante, kiom multe ĝi influos mian vivon.

Dum la sekvanta somero mi laboris kiel ordinara voj-laboristo en certa valo en montara regiono en Orienta Islando. Ni estis kune dudek homoj kaj loĝis en tendoj. Mi kunportis mian lernolibron de Esperanto kaj komencis ĝin studi en la vesperoj post la taglaboro. Mia kuntendano estis homo, tridek jarojn pli aĝa ol mi, bonkorulo, kiu tre respektis mian "edukitecon", preparis nian kafon kaj plenumis ĉiujn farendajojn de nia komuna tendara vivo, iusence mi povas danki al li la senzorgan cirkonstancon de mia Esperanto-lernado. Preskaŭ tuj mi estis tiom kaptita de la lingvo, ke mi uzis duonon de la tagmeza manĝopaŭzo por lernado, mi ankaŭ kunportis la libron en mia poŝto al la laboro kaj legis kelkajn frazojn en paŭzoj, kiuj ofte doniĝis.

Kiel supozeble tia dinamika metodo, motivita kaj motorita de entuziasmo pri la lingvo mem, nepre donas rapidajn rezultojn: en la aŭtuno post kelksemajna studo mi jam komencis korespondi kun eksterlanda esperantisto, svisa poŝtisto, kies nomon mi hazarde trovis. Kaj ne nur tio. Ege grava por mi estis preskaŭ tuja kontakto kun la frua periodo de la lingvo. Tiel estis, ke mia antaŭa instruisto en la duagrada lernejo, informita de mia patro pri miaj Esperanto-studoj, sendis al mi kelkajn librojn el la postlasitaj posedaĵoj de bona laboristo, kiu ĵus mortis. Tiu homo estis unu el la plej fruaj esperantistoj en Islando kaj abonis revuojn kaj mendis librojn el eksterlando. Inter tiuj estis

Mian knabaĝon mi pasigis en vilaĝo ĉe unu el la multaj fjordoj, kiuj tranĉas la bordojn de Orienta Islando. Ambaŭflanke de tiu fjordo altaj montoj levas siajn pintojn al la ĉielo. La fjordo mem estas profunda kaj riĉa je fiŝoj. La infanoj vivis libere, grimpane sur la deklivoj de la montoj aŭ hokante fiŝetojn de sur la multaj lignaj varfoj dise starantaj laŭlonge de la vilaĝa bordo. Ili ankaŭ frue partoprenis la laborojn de la plenkreskuloj, precipe dum la somero. Dum la vintro ili kompreneble devis ĉeesti la lernejojn, la solan en la vilaĝo.

En tiu lernejo instruis mia patro. Kaj ĉar li estis homo edukita li devis ankaŭ okupi sin pri diversaj aliaj aferoj de kulturo. Li prizorgis la komunan bibliotekon, aranĝis teatraĵojn, faris paroladojn je solenaĵoj. Li edukiĝis en la Pedagogia Lernejo en la ĉefurbo Rejkjaviko. Unu el liaj kunstudantoj tie estis fervora esperantisto. Li havis la kutimon saluti la kunulojn matene en Esperanto: "Bonan tagon!". Tion diris al mi mia patro. Dudek jarojn poste mi havis la okazon paroli kun tiu homo, tiam estro de duagrada lernejo. Li ne forgesis sian Esperanton, sed estis tro okupita por partopreni aktivadon por la lingvo. Mi diris al li mian ekkoniĝon kun Esperanto pere de lia siatempa "Bonan tagon"-saluto. Tio lin amuzis kaj ĝojigis.

binditaj jarkolektoj de la revuoj *Lingvo internacia* kaj *Juna esperantisto*, la poemaro *El parnaso de popoloj* de Grabowski kaj *Estu homo!*, traduko el la franca de Samuel Meyer. Pri tiu laste menciita mi havas belan memorajon. Kutime ni, la vojlaboristoj, veturis sabate hejmen kaj reiris al la envala tendaro dimanĉe vespere. Ni veturis per ŝarĝaŭtomobilo, sidantaj sur sendorsaj benkoj en ŝirmejo fiksita sur la platplanko de la aŭto. Estis libera loko malantaŭ la ŝirmejo kaj tie ni, la junuloj, ofte sidis por amuzo sur la plankfino. Tiel okazis, ke dum la aŭto transveturis malgrandan, senpontan rivereton mi, sidanta sur tiu riska loko, tiam legante la libron *Estu homo!*, subite ĝin perdis el la mano en la rivereton. Mi tuj kriis al la ŝoforo, ke li haltigu la aŭton, kion li faris, ektimante ke okazis akcidento. Feliĉe ne estis tiel, mi ensaltis la rivereton kaj elsavis la libron, nur iomete malsekan. Ankoraŭ hodiaŭ mi konservas tiun libron, ĝi montras ankoraŭ frontpaĝe la signon pri tiu aventuro.

Ĉiuj tiuj libroj devenas el la jaroj 1912 - 1913. Jen do legmaterialo, kiu kvazaŭ eksplode vastigis mian horizonton kaj maturige influis mian sintenon al la lingvo kaj ĝia kulturo.

Fininte la gimazon mi transloĝiĝis al Rejkaviko por studi en universitato. Jam tiam mi fianĉiĝis al mia samklasanino Thorey, kiu ankaŭ lernis Esperanton. Ankaŭ ŝia patro estis elstara esperantisto. Kiam mi vizitis unuafoje la hejmon de miaj estontaj bogepatroj - tiam ankoraŭ gimnaziano - la patro de mia fianĉino, pastro Halldor Kolbeins, alparolis min en Esperanto, kaj nur post duonhoro li ŝanĝis al la islanda. Ankaŭ nia filo Ragnar flue parolas Esperanton. Do ni havas ĉi tie tri generaciojn de esperantistoj.

Veninte al la ĉefurbo mi tuj aliĝis al la Esperanto-societo tie, al kiu mi apartenis ĉiam poste. Mi baldaŭ komencis verki en la lingvo, unue poemojn. Mi havas longan verkistan karieron ankaŭ en la islanda lingvo, sed mia Esperanta verkisteco estas al mi pli kara.

Mia sperto de lernado de Esperanto estas simple la jena: Nenio povas anstataŭi intereson, jes entuziasmon, en lernado de lingvo. Mi ne havis instruiston, mi lernis la lingvon en izoleco, per lernolibro malgranda, gramatike kaj literature orientita, malnaiva, fidanta al plena sindediĉo de la lernanto. Kaj mi emas kredi, ke ĝuste tia lernolibro estas la plej taŭga por subteni la intereson per sinsekve rapidaj kaj senhalte pliaj postuloj ĝis la klare antaŭvidebla fino. Tia estis la lernolibro de Th. Carl kaj tion atestis la multaj tradukoj de ĝi en aliajn lingvojn, i.a. la islandan. Kaj feliĉe estis tia libro, kiu trafis en miajn junulajn manojn antaŭ pli ol kvindek jaroj.

Baldur Ragnarsson


Poemoj

Sunoŝaŭme maro ŝvebas

Sunoŝaŭme maro ŝvebas
sub la klar' de l' norda bluo,
for de l' bordo ŝipo velas
pruon vipas onda fluo.

Gaje dancas sur la ondoj
sub lazura ark' ĉiela
mia bark' al novaj mondoj
ekster trov' de l' hom' kruela.

Ĉu atingos mi la celon
mi ne scias, tamen ĝojas,
hisas drame skuan velon
kaj en suno pluon volas



Bildo de Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]

Baldur Ragnarsson**Ankaŭ hodiaŭ matene ...**

Ni forgesis
ke ankaŭ hodiaŭ matene
sin levis la suno,
la floroj malfermis la petalojn,
la birdoj kantis kiel ordinare,
la infanoj prenis siajn ludilojn,
kaj la dolĉa vento kunportis iliajn ridojn
en la serenan bluan.

Ni forgesis tion
inter la premioj de l' vivbatalo,
blindaj, senmovaj muroj,
sub la memoj vidaj de l' indiferento,
la premaj kalkanoj de l' malamo
kaj la murdaj pezaj de l' stulto
ŝtono

vitro

ŝtalo

ĉio senliveca
falsa kaj supraĉa.

Ni forgesis
aŭskulti la fluŝtron de la koro
pri la nokta vivo de la maro,
pri la mola kresko de la herbo,
pri la milda silento de la lumo.

Ni forgesis
ke ankaŭ hodiaŭ matene ...

Nova vivo

Hodiaŭ
la fontoj disbranĉige ekpenetris
nian sekan tergrundon,
ilia zumo kresĉende sonas en ĉies oreloj
plena de bona forto kaj vekaj promesoj,
ni sentas kaŝitajn semojn ekŝveli sub niaj piedoj,
konscias ilian kreskon kiel gloran kantaton
pri la vivo.

Baldaŭ la verdaj flavaj kaj blankaj burĝonoj
aromos venke en la sinnutrada intenso,
kie antaŭe seke regis dezerto kaj soifo;
el niaj spuroj forgesitaj
leviĝos lilioj,
kaj pruvigis niaj pensoj polvumitaj
bazangulaj ŝtonoj,
ridoj kaj larmoj de iamaj sentmomentoj
disdonemaj sunoj kaj profundoj.

Kaj ni demandas nin mem:
Kial ni estis tiel honte senesperaj?
Kial niaj okuloj estis tiel ombritaj
ke ili ne vidis?
Niaj oreloj tiel fermitaj
ke ili ne aŭdis?
Niaj mensoj tiel dormaj
kaj frostaj niaj koroj?

L' insulo de l' poeto

Verŝas benon brila suno
sur la teron tra l' aero,
kisas monton dolĉa vento
blovetante zuman kanton.
Al la maro mi deziras
gaje kuri por plezuro,
vidi ondojn laŭe randi
blankan bordon de la
fjordo.

Ĉe la strando bark' atenda
prenas min en sian sinon,
kaj mi celas en petolo
insuleton de l' poeto.
Dancas barko kiel korko
sur la ondoj glate rondaj,
albordiĝas por rifuĝo
ĉe kvieta laguneto.

La aromon de poemoj
mi ekstare ĝue flaras,
versoj vibras kvazaŭefebre
en zefiro dolĉe spira.

Lulaj rimoj ade zumas
kaj murmuris ŝaŭmsusure,
frapas kordojn brila bardo
senprokraste por la gasto.

Kortuŝite mi ektretas
nur la teron plej liberan,
en ektazo elektrizita
himnon aŭdas eĉ en
plaŭdo.

Fulmas penso el la transo:
Prenu eron de la tero
por ekhavi mensan levon
dum modesta vivoresto.

Tuje agi penso logas,
mi elprenas manan plenan
de poema ter' aroma,
iras for kun ĝoj' en koro.
Ĉiam poste, kiam gastoj
min vizitas sen invito,
mi regale ŝtopas ilin
per porcio poezia.



Svetlana Kononova [Kaĉkanar, Rusio]

Heroo de kolektitaj ĉi tie diversĝenraj verkoj, ricevitaj el diversaj landoj, estas hejma lanuga amiko de homo.

Lui Laiqing [Yaan, Ĉinio]

Kato sur la luno

Poje vespere, kiam mi jam preskaŭ dormis, subite mi ekaŭdis, ke iu skrapas ĉe la fenestro kaj vokas min.

Mi proksimiĝis al la fenestro, malfermis ĝin kaj ekvidis mian konaton Georg, kiu loĝis sur la luno.

— Kara amiko, - diris li, - mi bezonas vian helpon.

— Mi ĉiam ĝojas helpi vin, - respondis mi. — Kio okazis?

— Musoj, - respondis li. — Sur la luno estas tiom da musoj, ke neniu volas loĝi tie, kaj mi ne povas edziĝi. Ĉar la virinoj timas musojn! Konsilu al mi, kion fari?


— Kaj krom tio la musoj ronĝas la lunon kaj ĝi iĝas pli kaj pli maldika, ja fin-fine ili eĉ ĝin formanĝos, kaj mi estos deviigata fari la lunon dekomence. Kaj tiel okazadas post ĉiuj 28 tagoj!

— Jes, malbonas la afero. Kiel mi povas helpi vin? - Momente mi renkontis okulojn de mia katino.

— Miaŭ-miaŭ! - diris ŝi.

— Belege, — respondis mi. - Mirinde, mirinde!

La katino forflugis kun Georg al la uno kaj fortimigis tie ĉiujn musojn. Nun ŝi jam revenis kaj kiel kutime dormas ĉe mia kuirejo. Kaj Georg fin-fine edziĝis. Nomo de lia edzino estas Mari. Kaj li estas feliĉa.



bildo de **Izmajlova Luiza** [Kuzneck, Rusio]

Santi Elena Bullo [Mestre, Italio]

Malgranda kato

Malgranda kato observas
kun verdaj okuloj
mian vizaĝon. Ĝi proksimigas
sian nazeton al mia vango.
Ĝi plezure ronronas apud mi,
Ĝian veluran nigran haron
mi plezure karesas...
verdaj okuloj ameme rigardas
min... kia al ĝi mi ŝajnas?

bildo de **Santi Elena Bullo** [Mestre, Italio]



E. BULLO 2003

Trovis kaj esperantigis
Opletajev Vladimir [Surgut, Rusio]

La kataj reguloj (konsiloj)

Tualetoj

Vizitu necesejon ĉiam kune kun la Homo. Vi bezonas nenion fari – nur sidigu apude kaj nepre gapu ĝin per rondaj okuloj.

Pordo

Neniam lasu pordojn en la loĝejo fermitaj! Por malfermi la pordon necesas leviĝi sur la malantaŭaj piedoj kaj per la antaŭaj puŝi ĝin (iujfoje estas rekomendate anticipi iom pendu sur la anso). Post kiam la pordo estos malfermita, vi povas plu paŝi por viaj aferoj. Se vi sukcesos malfermi la enirpordon, ne foriru! – sidigu apude kaj iom cerbumu. Speciale utila estas ĉi tiu proceduro dum pluvo, vento aŭ forta frosto.

Helpe

Se iu homo faras nenion, sed la alia male estas superŝutita de laboro, nepre restu apud la lasta. Tio estas nomata “helpi”. Jen kelkaj reguloj:

se la Homo kuiras starante, kaŝu vin post ĝia maldekstra piedo – tiel vi estos apenaŭ atentata kaj vi havos pli multe da ŝancoj, ke oni surtretos kaj sekve enbrakumos kaj poste karesos vin;

se la Homo legas libron, lokiĝu ĉe lia vizaĝo, preferinde inter ĝiaj okuloj kaj la libro, se vi nur ne povas kuŝiĝi senpere sur la libron;

se la Homo okupiĝas pri paperoj, sternu vin sur ili por kovri kiel eble pli multe da teksto, sed “vekigu” intermite kaj pelu perpiede skribilon aŭ krajonon.

Se oni vin forflankigis, sidu ĉe la tablorando kaj rigardu la Homon per tristaj okuloj – oni nepre surbrakumos kaj karesos vin;

se la Homo legas gazeton, disfaldinte ĝin antaŭ si, necesas nepre salti ekzakte en la mezon de la gazeto. Homoj ŝatas saltojn;

se la Homo laboras ĉe komputilo, promenu sur la klavaro, provu kapti indikilon de museto surerkrane, kaj poste kuŝiĝu sur la manoj de la Homo, kiam ĝi estos nur ektajpanta.



Irado

Kiel eble pli ofte kaj pli rapide preterkuru antaŭ la piedoj de la Homo, kiam ĝi estas ien iranta. Aparte utile farendas tio, kiam la Homo portas ion grandan – sur ŝtuparo kaj en mallumo. Tio helpas al la Homo evoluigi reakciojn kaj reguligi movojn.

Dormo

Nokte dormu nepre sur la Homo, laŭeble tiel, ke ĝi ne povu sin turni. Estas tre utile dormi sur la kapo de la Homo.

Kaŝado

Iujfoje kaŝu vin en la lokoj, kie la Homo ne povos vin kapti, neniaokaze reaperu dum tri-kvar horoj. La Homon panikos (oni ŝatas tion) la penso, ke vi forkuris aŭ falis de sur la balkono. Kiam vi revenos, oni nepre levos vin sur la brakon kaj karesos vin, eble ĉe oni kisos vin, kaj vi ricevos duoble pli da manĝaĵo ol kutime!

Ankoraŭ unu konsilo

Pli ofte saltu sur kurtenojn aŭ vestojn kaj pendu je la antaŭaj piedoj – tio estas tre utila kaj krome, homoj ŝatas “maŝojn”.

Lasta konsilo


Kiel eble pli ofte grimpu sur la bruston aŭ ŝultrojn de la Homo, por ke vi estu pli proksima al ĝia vizaĝo. Poste turnu al ĝi vian malantaŭon kaj levu la voston – homoj ŝatas tion! Ne forgesu fari la samon, kiam vian Homon vizitas Gastoj.

*Nia legantino el Francio **Ginette Martin**, foje malkovris diversajn speciojn de ĝardenposedantoj kaj ĝardenistoj. Sian tradukon de tiu amuza materialo ŝi sendis al la redakcio.*

La homo ĝardeneca, tiu nekonata ulo

La diversaj specioj:

Tradukita de **Ginette Martin** [Soulxures/Moselotte, Francio]
el la "Malgranda gvidlibro de la ĝarden-fako" de Jose-Louis Bocquet



Homo ĝardeneca vera:

Li posedas veran ĝardenon, inter 50 m² kaj 200 m². Tiu-ĉi ĝardeno ĝenerale situas ĉirkaŭ aŭ apud la domo, krom la porlaborista ĝardeno situanta malproksime de la domo, kaj dediĉata nur al la ĝardenlaboro aŭ la avideco de la tereno-aĉetistoj. Tiu ĝardeno povas esti urba aŭ kampara.

Homo ĝardeneca ĝardeneta

Li loĝas ĝenerale en urbo, ĉe la ter-etaĝo de granda domo aŭ en urba dometo; kaj mirakle disponas pri kelkaj kvadrataj metroj da herbo, 4 aŭ 5 m². La ĝardeno estas nomata de la urbo-planistoj: "privateca ĝardeno".

Homo ĝardeneca balkoneta

Ankaŭ li loĝas en urbo, sed en blok-domo. Li disponas nur pri balkono. Specialisto de la flor-kestoj kaj de la herbo por katoj.

Homo ĝardeneca salona

Li vivas en granda domo kaj ne posedas balkonon. Li devas kalkuli pri la sun-radioj filtritaj de la fenestroj. Se la salono ricevas sufiĉe da ili, ĝi povas iĝi ĝangalo. Tiu homo estas specialisto de la ekzotika verda planto en poto. Atentu, salono malbone orientita povas transformi tiun ĝardeniston en adepton de la plasta planto. (vidu pli sube).

Homo ĝardeneca kampara

Li kultivas necviteble pli grandan ĝardenon, ol la urbano. Ambaŭ havas nur du manojn kaj nur unu ŝpaton. Sed preter kelkaj centoj de m², oni ne plu estas ĝardenisto sed agrikulturisto.



Homo ĝardeneca kampara pensionata

Pro tro longa urba vivo, al tiu homo mankas sperto. Specialisto de la vundoj pro marŝado sur la dentoj de la kruelaj rastiloj, kaŝitaj en la herbo, kiuj atendas siajn viktimojn, ktp... Ofta kliento por la kuracistoj de la okuloj aŭ de la dentoj.

Homo ĝardeneca plastika

Li elektis verdajn plantojn kaj florojn el plasto. "Estas pli praktike" li deklaras. La legado de la sekvaj paĝoj ne utilos al li. Ni do adiaŭas lin de nun en tiu-ĉi parto de la libro.

Ĉi aŭtune laŭ invito partopreni la 92-an Japanan Esperanto-Kongreson, ni vizitis mirindan kaj belegan landon Japanion, landon kun riĉaj kulturaj tradicioj. La organizantoj de la E-kongreso afable disponigis al ni eblon partopreni en vera japana Te-ceremonio, pri kiu ni antaŭe multe aŭdis kaj legis. Ĝi estas vere ĝuinda nacia tradicio kaj ni volus rakonti pri ĝi en la rubriko "Diversaj ondoj el bunta mondo".

Japanana Tea ceremonio

Ekzotika kaj tial alloga por multaj te-ceremonio estas tre respektata tradicia arto por Japanio. Ĝi estis establita ankoraŭ en la 16-a jarcento de elstara te-ceremoniisto SEN Rikjuu ekzistas jam pli ol 400 jarojn. Fama majstro SEN Rikjuu kompletigis ĝin ĝis ĝia strikta klasika formo, kiu aspektas kiel perfekta rita filozofia spektaklo. Oni ankaŭ nomas te-ceremonion "la sinteza arto".

Laŭ etiketo oni okazigas te-ceremonion en ne tre granda sed noblaspekta ejo, uzante por te-kuirado specialan ilaron el ceramiko, bambuo, nobla ligno. Por la plena ceremonio oni bezonas kvarhoran tempon kaj ĝi konsistas el tri partoj: mem la zorga kuirado de teo, poste sekvas ceremonio de gustumado de densa teo kaj fine gustumado de maldensa teo. Te-ceremoniisto preparas ĉion tre atente kaj koncentrinte je procedo de te-kuirado; per agrablaj movoj, kun riverenco transdonas te-tason dekomence al plej honora gasto kaj poste laŭ vice al ceteraj ĉeestantoj. Gasto, sidante sur tatamoj surgenue, ĝuante malstreĉan kaj komfortan etoson, gustumas dekomence iun dolĉaĵon kaj poste verdan densan ŝaŭmigitan teon.

Kutime pendigita en la ĉambreto kaligrafajo, povas esti ankaŭ bela bildo, rafinita floraranĝo esprimas la sezonsenton de la te-ceremonio.



Jam laŭvoje al domo de te-ceremonio gastoj agordiĝas je interna harmonio, liberigatas de ĉiutaga tumulto kaj sekvanta poste te-ceremonio mem, senĝena konversacio pri arto kaj beleco, vere iĝas viviga gluto de trankvileco, harmonio kaj kreskigas internajn fortojn de homo, vivanta en ordinare febra, rapida moderna vivo.



Preparado de teo dum te-ceremonio en ĝardeno Sankcion en urbo Jokohama . Japanio

Karaj amikoj! Tradicioj de diversaj popoloj ĉiam estas unikaj kaj interesaj. Uzante la okazon ni invitas vin rakonti pri popolaj aŭ lokaj tradicioj, kiuj ekzistas aŭ ekzistis ĉe via popolo, en via lando aŭ en via loĝloko. Ni plezure publikigos viajn rakontojn sur paĝoj de "Komencanto"!

Ni daŭrigas la serion de materialoj pri ĝenerala lingvouzado kaj bona stilo, verkitaj de fama E-verkisto W. Auld (el libro "Kulturo kaj internacia lingvo").

Rolo de la bongusto

Je ĉiu paŝo, do, oni disponas, pli-malpli nekonscie, pri amaso da esprimeblecoj. Kiam Zamenhof verkis la esperantistan himnon "La Espero", li estus povinta skribi ekzemple:

Nova sento venis en la mondon,
Tra la mondo voko forta iras;
Facilvente flugu ĝi trans ondon
Ĝis ĝi ĉiujn lokojn jam alspiras.

aŭ

En la mondon venis sento nova,
Forta voko iras tra la mondo;
Perflugile vento facilblova
Flugu jam de homa rond' al rondo.

Sed ne. Li elektis skribi:

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.



Kononova Svetlana [Kaĉkanar, Rusio]

La preferindeco de lia teksto estas klara al ĉiu sana orelo (se vi dubas, provu kanti la variantojn!), kaj certe nekonscie li elektis ĝin. Sed la rolo antaŭ ĉio de poeto estas trovi la ĝustan lingvan formon por la konceptoj... Elektro de la plej bona kaj trafa estas afero de bongusto, kiu malgraŭ opinidiferencoj en lingvotaksado estas konstatebla kaj eĉ mezurebla fenomeno. Grandaj verkistoj estas plej ofte tiuj, kiuj altgrade posedas lingvan bonguston...

Abundaj alternativoj

Ne nur pri vortordo regas elekto, laŭ bongusto. Alternativoj abundas ĉiam, dank' al la strukturo de la lingvo.

Ekzistas elekto, ekzemple, inter adjekta prepozitivo kaj samsignifa ad- verbo. Depende de la kunteksto, oni povas diri per facila gesto aŭ facilgeste; laŭ alia maniero aŭ alimaniere; dum multaj jaroj aŭ multjare, k.t.p. Ad- verbo povas roli ankaŭ priskribe aŭ kompare: oni laboras kiel volontulo aŭ volontule; knabo kuras kiel leporo aŭ lepore... Tiu rimedo estas ofte konciziga.

Konciziga estas ankaŭ la ebleco diri: plenumitas anstataŭ estas plenumita, venontis anstataŭ estis venonta, k.s. Tiuj formoj estas korektaj kaj laŭ regule formitaj; oni ofte proponas ilin, kvankam ili malofte uzatas... Ili uzado aŭ neuzado estas afero de gusto.

Multaj kontraŭoj de Esperanto asertas, kvazaŭ tio estus memevidentaĵo, ke "kompreneble" en Esperanto ne ekzistas sinonimoj. Kulpas ni mem pri tiu fuŝa aserto, ĉar niaj unuopaj vortaroj plej ofte ne registras ĉiujn formojn efektive ekzistantajn... Ni mem do ofte kondutas kvazaŭ nur unu esprimformo estus ebla. Sed la vortprovizo de Esperanto deriviĝas dumaniere. Povas troviĝi por iu nocio radiko kaj ankaŭ almenaŭ unu kunmetita vorto.

Konsideru, ekzemple la parojn:

sobra / *malebria*; *afabla* / *bonkora*; *soldato* / *militisto*; *pirato* / *kaperisto*; *filantropo* / *bonfaremulo*; *paro* / *duo*; *zorgoplena* / *angoreta*. Konsideru la triojn: *barbira* / *hartondisto* / *frizisto*; *pigra mallaborema* / *malpenema*; *descendi* / *malsupreniri* / *desupri*. Konsideru la serion (tute ne kompletan): *putino*, *malĉastulino*, *amoristino*, *ĉiesulino*, *stratulino*, *prostitutino*, *amajistino*, k.t.p. Kiel en aliaj lingvoj, inter sinonimoj ofte sentiĝas nuanca diferenceto sed ili estas sinonimaj. Ankaŭ elekto de la ĝusta vorto venas sub la rubrikon estetiko aŭ bongusto.

Elekto, kiun ofte frontas precipe la prozverkistoj, estas: ĉu aktivo aŭ pasivo? Ĉu mi skribu, ekzemple: La poŝtisto estis mordita de hundo aŭ La poŝtiston mordis hundo? Tute klare, ambaŭ estas ĝustaj. Elektro dependas de stulfaktoroj: eleganteco, klareco, la ĝenerala etoso de la kunteksto. Tro abunda sinsekvado de pasivoj nepre efikas peze, kaj ne malofte fariĝas pro tio malfacile sekvi senĝene la sencon. Iom da eleganta variado samtempe faciligas la fluadon de la teksto kaj agrable variigas ĝin. Ekzemple, ambaŭ jenaj propozicioj estas tute bonaj: Mia rigardo de tempo al tempo estis allogata de la nur malforte brilanta spegulo. La luno estis preskaŭ tute forkaŝita de la nuboj...

Cetere, ni gardu nin kontraŭ unu danĝero tradukante: lingvoj strukture malsimilas inter si, kaj strukturo bela en originalo povas iĝi malbela en tro laŭvorta traduko, ekzemple, sinsekvo de pasivoj eleganta en la angla povas fariĝi tede peza se tradukanto tro sklave reproduktas tiun sinsekvon!

Similaj eblecoj svarmas, cetere. Ĉu mi diru belas aŭ estas bela, vomemas aŭ estas vomema, kaj kia diferenco nuanca inter la alternativoj? Kien mi starigu adverbos: ĉu mi diru, mi rapide trarigardis la gazeton, mi trarigardis rapide la gazeton, aŭ mi trarigardis la gazeton rapide? ...Sed respondo al la starigitaj kaj similaj demandoj oni trovu per zorga studado de rekonataj stilistoj (ekzemple Zamenhof, Kabe, Baĝy, Forge, Szilagyi, k.a.). Modeloj ne mankas al ni, kaj ili estas pli fidindaj ol ĉiaj teoriaĵoj.



La diferenco inter **pli** kaj **plu** estas tio, ke **pli** montras pli altan gradon kaj **plu** indikas daŭron.

Pli rilatas al nombro kaj kvanto: *donu pli da pomoj*. **Plu** signifas daŭron pri tempo kaj loko: *plu pagi, plu labori, plu marŝi*. "Mi ne deziras *pli* (multe) da kafe" signifas, ke mi estas kontenta pri tio, kion mi jam ricevis. "Mi ne deziras *plu* kafe" = antaŭe mi deziris, sed nun mi ne plu deziras. "La aeroplano levigis *pli* alten" (ol ĝi antaŭe estis). "La aeroplano levigis *plu* supren" (= daŭrigis la supreniĝadon).

Plu estas uzata ankaŭ kun la finaĵo "-e"; "Ni iru *plue*!" Necesokaze, kiam oni volas montri direkton oni uzas ĝin ankaŭ akuzative: "Li iris kelkajn paŝojn *pluen*."

Kelkfoje oni kunmetas **plu** kun verbo: "Post mallonga halto li *pluiris*" (aŭ iris plu, iris plue).

Ne plu estas alia, ol *jam ne*, kvankam la diferenco estas nur malgranda: "Mi *jam ne* iros hodiaŭ al frizisto" = mi intencis iri hodiaŭ, sed ne iros; aliparte: "Mi *ne plu* vizitados tion friziston" = mi fakte vizitadis lin antaŭe, sed de nun mi ne daŭrigos (ĉesigos) miajn vizitojn.

Ne jam ankoraŭ ne. "La leterportisto *ne jam* venis hodiaŭ" = ankoraŭ ne venis hodiaŭ. D-ro Zamenhof rekomendis uzi *ankoraŭ ne*.

Ankoraŭ, jam, plu

Ankoraŭ havas du sencojn: 1) aldone, ree, pli. Ekzemple: "Mi petas ankoraŭ unu tason da kafe." "Mi intencas resti tie ĉi ankoraŭ kelkajn tagojn. Diru tion ankoraŭ unu fojon (aŭ ankoraŭfoje)!" kaj 2) ĝis nun. Ekzemple: "La prezentado ankoraŭ ne komenciĝis." "Li ne estis ankoraŭ tie ĉi." "La ĉambro ne estas ankoraŭ varma".

Jam — ekzemple: "La prezentado jam komenciĝis." "Li jam estas tie ĉi." "La ĉambro estas jam varma."

Krom daŭrigo, kiun ni pritraktis antaŭe, **plu** montras kun nea vorto ankaŭ ĉesigon de ago aŭ stato: "Li ne estas plu tie ĉi" "La ĉambro ne estas plu varma". "Mi ne kredas plu vin."

Kelkaj uzas en ĉiuj tri okazoj **jam**: "La infano ne jam (- ankoraŭ ne) ploras". "La infano jam ploras". "La infano jam ne ploras". Sed pli klare estas: "La infano ankoraŭ ne ploras". "La infano jam ploras". "La infano plu ne ploras". Kelkaj lokigas la vorton **ne** ĉiam antaŭ **plu**: "Mi ne plu kredas tion".



bildo de
Anna Kornjuhina [Bamaul, Rusio]

AFORISMOJ

Trovis kaj esperantigis
Anatolij Romanov [Osa, Rusio]

El vivo de leporoj

Kiun vi preferas renkonti en arbaro – bonkoran lupon aŭ malican leporon?

A. Hodorovski

*

Kuniklo estas civilizita leporo.

A. Regulskij

*

Karoto tutcerte estas utila por okuloj. Ĉu vi iam vidis leporon en okulvitroj?

AV



Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]

Kolektis kaj esperantigis
Dmitrij Tokarjev
[Reutovo, Rusio]

Plej malfacilas eliĝi el ŝuldoj kaj el varma lito dum frosta mateno.

AV

*

Amikoj helpas vivi, sed malhelpas labori.

T. Kotarbinskij

*

Pliibonas mustardo post tagmanĝo ol anstataŭ ĝi.

R. Podlevskij

*

Fraŭlino volas nur edzon, sed la edzino volas jam ĉion.

Angla proverbo

*

Ĉiuj eminentaj homoj havas nomojn de stratoj.

C. Bruto

*

Krokodilo ĉiam devas elekti inter vivo kaj monujo.

O. Popov

*

Popularaj verkistoj kutime estas nepopularaj inter la verkistoj.

M. Fernandez

sendis al la redakcio
Tatjana Ivanova
[Tverj, Rusio]

Anoncoj en ĵurnaloj

□ *Sperta pedagogo montras al via infano ekzemplon, kiel oni devas bone manĝi ion ajn.*

□ *Rapide kaj klare instruos al via infano rapidecon kaj klarecon.*

Stanislav Jeĵi Lec

Nekombitaj pensoj

Esperantigis
Rinat Hismatullin
[Nijnekamsk, Rusio]

Eĉ en lia silento estis gramatikaj eraroj.

*

Pensu, antaŭ ol pripensi!

*

Kio lamas, tio tamen iras.

*

Por atingi la fonton necesas naĝi kontraŭ akvo-fluo.

*

La tutan tagon ne povis rememori la vorton "giljotino". La kapo kontraŭstaris.

*

Kutime ariergardo de antaŭa avangardo iĝas avangardo de nova ariergardo.

*


Ĉiu epoko havas sian mezepokon.

*

Apetito aperas dum la manĝo, sed ne malaperas dum malsato.

*

Tiu, kiu komprenas en nenio povas okupiĝi pri ĉio.



Kolektis kaj esperantigis
Kurz Anatolij
[Višnevogorsk, Rusio]

Parolas du konatoj:

— Mi ne komprenas, kiel vi dum unu tago povis fari tiom da stultajoj?
— Mi tre frue vekigās.

*

Sklerozon ne eblas kuraci, sed pri ĝi eblas forgesi.

*

Balbutanta homo demandas preterpasanton:

— Ppppardddonu, kie trovvvviga llernerjo por baaaabaaalbutantoj?
— Por kio vi bezonas lernejon por balbutantoj, vi jam nemalbone balbutas...

*

Iluzio:

Mi volas vivi eterne. Kaj dume ĉio pasas normale...

*

Ĝi estas interese:

Kia specifaĵo estas desegnita sur la kanada flago, se oni kuŝas ĝin post folieto?

*

— Policisto haltigas ebrian viron, kiu kuŝas sur la ŝoseo.

— Kial vi kuŝacas sur la aŭtovojo ebria?

— Ĉar mi perdis...

Kion vi perdis?

— Mian ekvilibron...

Dum gramatika leciono.

— Mi falas, vi falas, ili falas, ni falas... Kia estas la tempo?

— Ĝi estas tempo atente rigardi antaŭ si.

* * *

esperantigis **Silkina Olga** [Permj, Rusio]

El vivo de kuracistoj

— Sinjoro kuracisto, mi konstante aŭdas iujn voĉojn...

— Kaj kion ili diras al vi?

— Mi ne komprenas, ĉar mi estas iom surda.

*

Kuracisto al kliento:

— Kialo de via malsano estas alkoholo.

— Dankon, s-ro kuracisto, vi estas la unua, kiu ne kulpigas sole min.

*

Dentisto al la kliento:

— Malfermu la buŝon. Pli vaste! Ankoraŭ pli vaste...

— Sinjoro kuracisto, ĉu vi volas tien rigardi aŭ eniri?

Interparolas du psikiatroj:

— Mi havis interesan okazon en mia praktiko. Al mia paciento okazis "duopiĝo" de personeco.


— Kaj kio estas speciale interesa en tio?

— Mi sukcesis interkonsenti pri la pago kun ambaŭ aparte.

*

— Per kio diferencas psikiatro kaj psikologo?

— Kontraŭ sendormeco psikiatro rekomendas al paciento dormpilolojn, kaj psikologo – kalkuli ŝafojn!



Kornjĥina Anna [Barnaul, Rusio]



ESPERANTISTA KAT-AMIKARO

Karaj amikoj! En rubriko "La praktiko" ni rakontas, kiel diverse oni povas praktiki nian lingvon. Hodiaŭ ni prezentas al vi internacian E-organizaĵon, kies membrojn kunigas ilia amo al katoj. Tio estas internacia organizaĵo de kat-amantoj, kiu nomiĝas:

Esperantista
Kat-Amikaro
aŭ
Rondo Kato

Bazaj informoj:

Estas fondita en 1986.

Membroj en 36 landoj.

Prezidanto

d-rino **Marjorie Boulton**, Britio.

Sekretario

s-ino **Ingrid Nasholm**, Svedio.

[Lindbergsg. 4, SE-853 56 Sundsvall,

Svedio] tel: 060-61 22 14,

rondokato@hotmail.com

Celoj:

— Faciligi kontakton inter esperantistaj katŝatantoj.

— Informi esperantistojn pri Rondo Kato kaj la valoro de katoj.

— Informi inter neesperantistaj katŝatantoj pri Rondo Kato kaj Esperanto.

— Interŝanĝi kaj vendi diversajn poŝtmarkojn kaj bildkartojn kat-temaj kaj helpi diversmaniere laŭterme

Organo:

"Folioj de Kat-amikaro"

— 3 numeroj jare.

redaktas **Francisco Veuthey**, Nieuwe Binnenweg 70-I-R NL-3015 BC Rotterdam, Nederlando,

folioj@hotmail.com

Rondo - kato

la portreto de kato **Paramoŝa** el urbo Vladivostok desegnis
Ingrid Nasholm, [Sundsvall, Svedio]



Rakontas Ingrid Nasholm,

sekretario de la Rondo-Kato, [Sundsvall, Svedio]

Kiel videble la klubo fondiĝis en 1986. Kaj la unua kunveno estis dum la UK en Tampere en 1995 kaj post tio oni regule renkontiĝas dum ĉiu UK. Nia gazeto "Folioj de Kat-Amikaro" komencis sian ekziston per eta provnumero en 1993 kaj ĵus aperis jam la 39a numero. Dum 5 unuaj jaroj la gazeto estis redaktita de Ingrid Nasholm, Svedio, kaj poste de Francisco Veuthey, Nederlando.

El miaj propraj spertoj, estas tre agrable havi eblecon diskuti kaj babili pri siaj amataj katoj kun aliaj katŝatantoj de aliaj landoj kun aliaj spertoj, tamen kun la sama amo al tiuj interesaj bestoj. Al la gazeto venas materialoj de diversaj kulturoj pri la interesaj katoj. Korespondi letere kaj iastatempe ankaŭ rete estas agrable.

Nuntempe ankaŭ eblas viziti retan diskutejon:

<http://groups.yahoo.com/group/verdakato>

Mi rekomendas viziti tiun paĝon, se vi estas bestŝatanto.

La gazeto "Folioj de Katamikaro" estas interesa, kaj kiel membro de la "Rondo-Kato" vi ricevos ĝin. Mi mem kunigas interesajn katfotojn kun esperanta teksto kaj vendas ilin por helpi kolekti monon por fari koloran gazeton. Kiel bredisto de katoj de sibria raso mi metis sur mian hejmpaĝon www.isrosen.se multajn fotojn, sed ankaŭ iom da esperanta teksto pri mia lasta internacia bredo. Katpatro de mia nova kat-generacio nomiĝas *Paramoŝa*, li venis el Vladivostok, Siberio, kaj la katpatrino mem estas naskita en Svedio (kiu siavice havis patrino el Finnlando kaj la patron el Germanio).

Katoj estas interesaj kaj amikecaj bestoj, kiuj devus esti prestiĝaj laŭ sia vera valoro kaj ne forlasitaj por malsati kaj frosti. Katŝatanto ofte estas inteligenta kaj tolerema homo por sperti la psikajn valorojn de la katoj.

Ni proponas al via atento novan rebuson, kiu verkas laŭ nia mendo

Sergej Dolbilov [Bogdanoviĉ, Rusio]

Proverbo

Oni devas trovi kaj deĉifri en litera kaso proverbon, kiu mi prenis el la "Proverbaro" de L.L. Zamenhof

La malplenaj kadroj signifas intervortan spacon. Oni rajtas legi dekstren-malfdekstren-supren-malsupren, nur ne diagonale.

La proverbo povas komenciĝi en ajna loko de la rebuso. Por klarigi mi donas ekzemplon. En tiu ekzemplo estas enskribita proverbo

"En ĉiu sezono estas sia bono".

n (2)	e (1)	u (6)	(7)
(3)	ĉ (4)	i (5)	s (8)
n (12)	o (11)	z (10)	e (9)
o (13)	s (16)	t (17)	a (18)
(14)	e (15)	(20)	s (19)
a (23)	i (22)	s (21)	o (28)
(24)	b (25)	o (26)	n (27)

Bonvolu trovi la kaŝitan proverbon de L.L. Zamenhof

o	r	k	i
m	p	m	a
e			k
n	o	t	a
a	s		l
	j	o	a
f	e	s	
t	s	u	m
e	n	a	s

Kio estas sur la bildo?



"Komencanto"-3 Solvoj de la enigmoj.

Preskaŭ ĉi ion korekte divenis **Anton Loŝmanov**

[Komsomolsk-na Amure, Rusio]

Kompletigu la titolojn


1. Vivo de centprocenta esperantisto (Saharov)
2. Kongresaj paroladoj (Zamenhof)
3. La faraono (Prust)
4. Fundamento de Esperanto (Zamenhof)
5. Neĝa blovado (Grabowski)
6. La infana raso (Auld)
7. Estas mi esperantisto (Baghy)
8. Sekretaj sonetoj (Peter Peneter)
9. Ĉu ŝi mortos trafike? (Nemere)
10. Gerda malaperis (Piron)
11. El la biblio (Zamenhof)
12. Esperantisto, eksto kaj malapero (Schwartz)
13. Varmas en Romo
14. Lingvaj respondoj (Zamenhof)
15. Vojaĝo en Esperanto-lando (Kolker).

Salo-Tero Salo-sako-suko-tuko-teko-tero

Sinsekvaj vortoj

Aforismotoromanomamindumi

"Komencanto"-4 Solvo de Vegetara krucentigmo



Bill Thorne



RIMARO

ONO

akordiono
barono
betono
bezono
biliono
bizono
bombono
bono
citrono
ĉampiono
ĉiĉerono
ĉifono
demono
depono
felietono
fono
impono
madono
mikrofono
miliono
mono
musono
ono
ordono
ozono
pantalono
patrono
pensiono
perono
persono
plafono
prizono
rezono
salono
sezono
sono
spiono
stadiono
ŝtono
telefono
tono
trombono
trono
Usono

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas 30-jara komencanto, volas korespondi por plibonigi mian Esperanton.

s-ro Geert Janssen

Pelsterstraat 115

Roermond

Nederlando

GeertJanssen@gmx.de

Mi estas 19-jaraĝa komencanto el Filipinoj, studanta en universitato. Mi volas korespondi kun iu ajn, kiu ankaŭ volas korespondi. Int: diversaj landoj, kulturoj, amikeco.

Raymond Lu

Filipinoj

raymondlu@gmail.com

Mi estas komencantino kaj deziras korespondi kun komencantoj. Int: lingvistiko, muziko, historio, ktp.

Gerelmaa Ithagvasuren

Ulaanbaatar

Mongolio

gerelmaad2004@yahoo.com

Deziras korespondi tutmonde

Stanislav Penčev

Stoikov

ul. Druj ba 5 vk 5 ap 13

Gorna Orjahovica

5100

Bulgario

Mi estas 23-jara studento de lingvistiko kaj instruisto de E-o. Por gajni monon mi verkas programojn. Mi havas amason de diversaj interesoj kaj volas korespondi kun iu ajn pri io ajn.

Josuo Brandt-Young

Berkeley

Usono

vionau@gmail.com

Mi estas 21-jara studento, fraŭlo. Mi volus ricevi leterojn por daŭrigi lernadon de Esperanto Int: muziko, lingvoj, futbalo, arto, desegni, i.a. Mi promesas respondi al ĉiuj!!!

Alexander Lopez Perez

Urb. Loto #2, casa 11m,

San Jerónimo de

Desamparados,

San José,

Costa Rica

aleks_tiko7@yahoo.es

Al mi plaĉas konatiĝi kun novaj homoj. Mi estas studento tre scivolema pri preskaŭ ĉio: historio, kutimoj, vivmanieroj de aliaj landoj. Int: literaturo, kulturo, klasika muziko, scienco, historio, Eŭropo, arto...

Flávio Castro

Professor Barreto nº 40 /

Centro/Cep:

37280-000 Candeias/MG

Brazilo

flaviodicastro@yahoo.com.br

la bildon sendis **Bill Thorne** [Londono, Britio]



KOMENCANTO 2006

Ne forgesu reaboni!

Mi estas fratino 18-jara, meksika komencantino. Mi studas juron en Universitato. Plaĉas al mi verda koloro, la luno, aŭtuno, la katoj kaj ĉina manĝaĵo. Mi interesiĝas pri poezio, muziko moderna kaj popola. Mi volas korespondi pri kutimoj, ekonomiko de diversaj landoj, muziko, arto, ktp.

Cynthia Catalina Muez

Andrade

Meksiko (Meksikurbo)

Meksiko

cynthiacma86@yahoo.com.mx

Mi volas ricevi viajn leterojn! Kaj mi esperas trovi geamikojn el la tuta mondo por interŝanĝi leterojn! Skribu al mi per normala poŝto al: retpoŝto. Mi ĝojas! Int: Esperanto, Lingvoj kaj kulturoj, legado, naturo, skribi kaj ricevi leteroj, ktp....

Daniel Laufer

Danziger Str. 41,

29633 Munster

Germanio

diman.begun@freenet.de

Mi estas meznivela esperantisto, 57-jara. Mi deziras korespondi kun inteligentaj personoj pri preskaŭ ajna temo. mi estas ĉiam preta lerni ion novan. Mi laboras ĉe prizono; sed ankaŭ magistris je psikologio.

Russell Watkins

155 W. Main St. Apt. 4

Monrovia, Indiana 46157

Usono

rwatkins@ccrtc.com

Mi estas 35-jara pola instruisto, kiu nun vivas kaj laboras en malgranda vilaĝo. Mi instruas en la baza lernejo kaj samtempe mi estas la direktoro. Per Esperanto mi volas amikiĝi kun la personoj (familioj), kiuj tiel kiel mi pensas pri la paco kaj amikeco en la mondo. Int: vojaĝoj, naturo, fotografio, montaroj, laboro en lernejo

Radek Sienicki

Biafe - Szczepanowice

10/4, PL07-325, Boguty.

Pollando

drks@op.pl

Mi estas 33-jara aŭstro kaj tre ŝatas korespondi kun fraŭlino el Rusio, Ukraino, Hungario, Slovakio, Ĉeĥio aŭ el iu alia parto de la mondo. Int: ekologio, ekonomio, interreto kaj ĉefe Esperanto-projektoj.

Otmar Liebhart

Moedling

Aŭstrujo

o.liebhart@gmx.at

komencanto@r66.ru

<http://Komencanto.narod.ru>

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

